355.244.1

# MILITPROPAGANDO (III)

de d-ro W. WINSEMIUS (Nederlando) [1].

**„Senmaskigo" de propagando.** — Kiel evidentiĝas el la antaŭaj artikoloj — kvankam multaj gravaj aspektoj, kiel ekz. la rolo kiun ludas nekonsciaj procezoj, devis resti nekonsideritaj —, estas nepre tre naive kredi, ke propagando konsistas el nombro da retorikaj „artifikoj" kiujn scipovi (ja malfacila „arto") sufiĉas por ke oni povu kredigi al la „stulta amaso" kion ajn oni volas. Tamen ĉi tiu opinio estas ankoraŭ tre disvastigita: oni opinias ke ĉiu propagando karakteriziĝas de mensogoj, kiujn oni kredigas per artifikoj. Kelkaj el ĉi tiuj artifikoj estas: la ada donado de emocie ŝargitaj epitetoj al figuroj kiujn oni volas kontraŭbatali, ekz. „la faŝista militincitulo A", „la judo B", „la ruĝuloj", „reakcia", „sendiulo", ktp. Plue: la uzado de impone sonantaj, sed fakte neniondiraj ĝeneralaĵoj tiaj kia: „ni ŝuldas al la memoro de niaj falintaj herooj ĝisekstreme defendi nian nacian honoron". Aŭ: la uzado de la motivo „ĉiu", ekz. „ĉiu nederlandano" aŭ „ĉiu honesta homo estas konvinkita, ke ......" Kaj ekzistas ankoraŭ multaj aliaj, ĉe la plimultaj el kiuj oni povas klare indiki, je kiuj valoroj ili apelacias.

La menciita opinio forgesas tamen unuflanke, ke tre bone eblas propagandi ne uzante ĉi tiun specifan frazeologion, kaj aliflanke ke propagando ne ĉiam devas konsisti el „mensogoj"; ankaŭ la vero ne estas en la pli multaj kazoj tiel evidenta ke ĝi akceptiĝas sen propagando. Ĉiuj ĉi tiuj artifikoj estas nur rimedoj, efektive pli aŭ malpli ofte uzataj en la propagando, sed ne esencaj. La samo rilatas al la opinio ke ĉiu propagando esence baziĝas sur „sugestado", kiu termino ja signifas ĝeneralan priskribon, sed ne klarigon de la efiko de propagando. Oni ne akiras komprenon, vidante de la propagando nur ĉi tiujn rimedojn kaj rigardante la publikon nur kiel inertan „stultan amason" sur kiun la propagando efikas same nemalhelpate kiel la vento sur ventomontrilon aŭ kiel guto sur ŝtonon. Nek oni povas imunigi publikon kontraŭ propagando per grandskala diskonigo de ĉi tiaj artifikoj kaj instruado rekoni kaj „senmaskigi" ilin: publiko en kiu vivas fortaj bezonoj kaj deziroj, kaj kiu ne konas alian realon ol tiun prezentadatan al ĝi de ĉionĉirkaŭprena propagando, neniel influiĝos de ĉi tia „senmaskigo" kaj plu kredados tion kio konformas al ĝiaj bezonoj kaj deziroj. Oni povas nomi tian sintenon „stulta", sed tia stulteco troviĝas tute tiel same ĉe intelektuloj, kaj eĉ ĉe la „senmaskigantoj" mem kiuj ja komencas sian senmaskigan agadon nur ......... sub la influo de iu aŭ alia propagando.

**Porpaca propagando?** — En la unua artikolo en ĉi tiu serio ni rimarkigis, ke militpropagando ne havas facilan taskon: ĝi devas trovi la bonajn argumentojn por igi la homojn fari la malbonon. Ĉu do porpaca propagando ne havas taskon multe pli facilan, ĉar ja en ĝia kazo ne ekzistas tia kontraŭeco inter motivadoj kaj rezultoj?

[1]) El *„Wetenschap en Samenleving"*, **6** (n-ro 6) 300-305. (Komparu noton 1 sur la antaŭa paĝo.)



La respondo al tio devas esti: se, 1e, la stato de paco efektive estas pozitive aprezata de ĉiu, kaj se, 2e, ĉiu scias proksimume kiel li devas konduti por efektivigi ĉi tiun staton, resp. por igi ĝin daŭri, do tiukaze la tasko de la porpaca propagando efektive estas tiel facila, ke ĝi eĉ estas superflua.

Se sub stato de paco ni komprenas: staton en kiu ĉiu homo estas sufiĉe certa ke li povas trankvile vivi sian ĉiutagan vivon kaj ne estas en sia ekzisto minacata de arbitra fizika perforto, do montriĝas ke efektive, ekzemple, interne de vilaĝo aŭ urbo, aŭ eĉ interne de bone regata moderna ŝtato, ja okazas malpacoj kaj konfliktoj — relative malgrandaj neperfektaĵoj kaj perturboj de ekvilibro —, sed nepre ne militoj. Ĉiu tie precize scias kion li devas fari por daŭrigi ĉi tiun staton, nome konduti laŭ la formalaj kaj neformalaj reguloj, preskriboj kaj leĝoj de la sociaj interrilatoj kaj konduto. Ampleksa propagando por tio ne estas bezonata (almenaŭ se oni ne ankaŭ la normalan edukon alkalkulas al la propagando) kaj normala polica aparato estas sufiĉa por teni devian konduton inter tolereblaj limoj.

Se nun ni turnas nian rigardon al internaciaj komunoj, t.e. en nia tempo al la mondo kiel tuto, ni vidas ke ja la unua kondiĉo estas plenumita: ĉiu aŭ preskaŭ ĉiu volas pacon, sed la dua kondiĉo tute ne estas plenumita, ĉar en la nuna momento neniu precize scias kion li devas fari aŭ pensi por konservi la pacon. Pli ĝuste dirite: ja ekzistas politikaj kaj aliaj dogmoj je kiuj oni povas kredi kaj laŭ kiuj oni povas agi, sed pri neniu el ili estas efektive pruvite aŭ eĉ nur kredebligite por la nekredantoj, ke laŭa konduto kondukas al paco. Tiel, ekzemple, neniu scias ĉu nia lando, por kontribui al la konservado de la paco, devas sin armadi jes aŭ ne, forte, modere, aŭ nur iomete. Kaj ke ni ne scias tion, trovas sian kaŭzon en tio, ke efektive nian mondon, en kiu ni vivadas, ni tamen tute ne konas, eĉ se ofte ni opinias la malon.

**Formado de bildo de la mondo.** — Oni ofte asertas ke la moderna tekniko de la komunikiloj faris la mondon malpli granda. Sidas peco de vero en ĉi tiu aserto, nome, ke malgranda malplimulto de la mondloĝantaro nun povas pli facile kaj en malpli longa tempo sin translokigi fizike tra grandaj distancoj, kaj ke ekzistas multe pli vastaj ebloj de transporto ol antaŭe, i.a. por soldatoj kaj milita materialo. Tamen ankaŭ sidas almenaŭ same granda peco de malvero en ĝi, ĉar por la multe pli multaj el ni la mondo ĉiam ankoraŭ estas senmezure grandaj kaj fremda ......... sed ordinare ni ne konscias tion, ĉar pri ĉiaj situacioj kaj eventoj, ankaŭ en la plej malproksimaj regionoj, ni informiĝas nur per onidiro.

La mondo ne malpligrandiĝis, sed nin ĉirkaŭadas, sufokminace, b i l d o de la mondo el la dua mano, bildo konsistanta el gazetartikoloj, raportaĵoj, filmĵurnaloj, radioparoladoj ktp., mallonge: el bildoj kaj babilaĵoj, — bildo eĉ, kiun ni ne mem elektis, sed kiun antaŭmetas al ni profesiaj informistoj kiuj selektis ĝin, parte surbaze de tio kio laŭ ilia sperto kaj laŭ kelkaj nenetaj

konvencioj, estas grava, interesa, aŭ ĝenerale „novaĵo", kaj parte ankaŭ surbaze de pli aŭ malpli konsciaj propagandaj konsideroj [1]).

Kontraŭ tio staras, ke la vera, mem-spertata peco de la mondo por ĉiu el ni ĝenerale malpliriĉiĝis: niaj vivaj, personaj spertoj ne havas plu tian riĉecon, kia igas ilin malgranda, sed en si kompleta mondo, kiel eble ankoraŭ eblas en tre izolitaj vilaĝoj aŭ ĉe ankoraŭ ne malkovrita tribo de papuoj. Ni havas kiel relativan firmaĵon niajn normojn kaj valorojn — nia deziro pri paco, ekzemple, indikas tion — kiuj, kun paso de la tempo, ja grade ŝanĝiĝas, sed en siaj pli fundamentaj karakterizaĵoj tamen nur treege malrapide, spite ĉiujn frazojn pri *„Umwertung aller Werte"* (Alivaloriĝo de ĉiuj valoroj). Sed kiel aspektos niaj konvinkoj kaj nia rezulta individua kaj kolektiva konduto rilate al la realo, tio tute dependas de tio, kia ni imagas tiun realon aŭ kia ĝi estas prezentata al ni.

La mezepoka kamparano en okcidenta Eŭropo, kaj eĉ la mezepoka reĝo, ne bezonis formi al si opinion pri politikaj kondiĉoj en Japanujo aŭ Ĉinujo, sed ni devas; tamen, nia tuta scio pri okazaĵoj en tiuj landoj baziĝas preskaŭ nur sur tio, kion ni prie legas en la gazetoj, ktp. Intelektuloj nur nun komencas eltrovi ke ilia realo estas grandaparte ŝajno, konsistanta trepligrandparte el asertoj intencataj, konscie aŭ ne, kiel propagando, kies ver-enhavon ni neniel povas kontroli. Kompreneble ĉi tio ne validas pri ĉiuj informoj kaj asertoj.

Legante en la ĵurnalo, ke en Brazilo okazis fervoja akcidento kiu kaŭzis la morton de 86 homoj, ni neniel pridubas la verecon de ĉi tiu sciigo, maksimume nur la ĝustecon de la nombro 86. Sed jam la situacio ŝanĝiĝas, se tiaj sciigoj ripetfoje troviĝas kaj se ni havas kialojn por supozi ke ili devenas el kontraŭbrazila fonto. Prenu ni, kiel aktualan ekzemplon, la jenan aserton: en Sovetio 20 milionoj da homoj troviĝas en koncentrejoj. Ni rimarkas, por komenci, ke ĉi tiu aserto, konscie aŭ ne, povas esti intencata kiel propagando, sed ke ĉi tiu distingo ne multe gravas, ĉar ĝi en la hodiaŭa situacio neeviteble efikas propagande. Ĝi enhavas konstaton pri la fakta situacio kaj per tio povas kontribui al nia bildo de la realo. Ni ĉiuj scias kion signifas koncentrejoj kaj se ni akceptas ĉi tiun aserton kiel veran, ni devas malfavore inkliniĝi rilate al Sovetio — eĉ tiom, ke, se antaŭe ni havis favoran opinion pri ĉi tiu ŝtato kaj se ni deziras konservi ĉi tiun favoran opinion, ni estas devigataj nepre ne kredi ĉi tiun aserton.

[1]) Mi rimarkigu ke ĉi tio ne signifas „atakon" kontraŭ la ĵurnalistoj ĝenerale ......... Ke kapabla ĵurnalisto kun sia „sana prudento", sia edukiteco, sia sperto kaj sia intuicio aŭ sesa sentumo por la fidindeco de siaj fontoj ofte povas doni pli bonkvalitan informadon ol iu kiu ne disponas pri ĉi tiuj profesiaj kapabloj, tion mi nepre konsentas. Sed mi ege dubas, ĉu ĉi tiuj ecoj sufiĉas por eltrovi en iuj kazoj kio efektive okazas aŭ okazis. La simpla kialo por tio estas, ke por fari laŭveran raporton pri iom komplikitaj situacioj kaj okazaĵoj oni bezonas laŭsisteman observadon kaj analizon, kaj alireblon kaj kontroleblon de ĉiuj fontoj, kio plej ofte superas la eblojn de ĵurnalisto ne malpli, aŭ eĉ ankoraŭ pli, ol tiajn de kia ajn alia mortulo, ĉar li ja devas liveri „novaĵon" kaj ofte ne povas permesi al si eĉ unutagan prokraston.



Sed nun pri la demando ĉu la aserto estas vera. Sendube ĝi povas esti vera: la nombro de la enkoncentrejigitoj en Sovetio estas aŭ 20 milionoj, aŭ ne. Sed iu kiu volus tion kontroli, povus tion fari principe nur en unu maniero, nome sisteme traŝercante la tutan Sovetion kaj nombradante ĉiujn malliberulojn en ĉiuj koncentrejoj. Aŭ, almenaŭ, li devus fari fidindan specimenan provon, kiu ebligu al li fari taŭgan taksadon. Estas klare ke tia kontrolo praktike neniel estas farebla. Rilate al la menciita aserto oni do povas:

1. kredi ĝin,
2. malkredi ĝin,
3. nek kredi, nek malkredi ĝin.

La tria eblo ŝajnas la plej racia, sed fakte estas al ni preskaŭ plene neebligata. Ĉi tio evidentiĝas se ni konsideras la menciitan aserton en ĝia kunligo kun aliaj asertoj, nome jene:

a. Sovetio klopodas subigi al si tutan Eŭropon,
b. troviĝas tie dudek milionoj da homoj en koncentrejoj.

Se oni kredas la aserton sub (a), oni povas klopodi taksi, surbaze de la aserto sub (b), kiel granda estas la ŝanco ke oni mem post ne tre longa tempo trafos en koncentrejon, kaj ĉi tiu antaŭvido ne estas tre taŭga por inklinigi nin al la filozofia sinteno „akcepti nek rifuzi tion kio ne povas esti pruvata". Kompreneble ankaŭ la aserton (a) oni povas aŭ kredi, aŭ malkredi, aŭ akcepti nek rifuzi, sed denove la lastan alternativon malebligas abundo da plua propagando: asertoj pri rusa armado, kaŝa komunista „incitado", komplotoj, atakemo, ktp.

La rezulto de tia propagandado kompreneble estas: timo, kaj pro ĉi tiu timo la por- kaj pro-ekzistada neceso elekti inter kredo kaj malkredo (t.e. kredo al la kontraŭa propagando), dum de la tria eblo restas nenio alia ol maksimume la neracia fuĝo, al kiu ni ĉiuj ja iel kaj iom nin transdonas: ignori, ne pensi pri tio, „esti gajaj, ĉar morgaŭ ni mortos".

La traktita ekzemplo hazarde venas el la kontraŭkomunisma propagandosistemo, sed por la komunisma validas tute la samo; ni povus esti prenintaj, ekzemple, ankaŭ la aserton ke la alianca armeo en Koreujo militis per bakteriaj armiloj. Kie en demandoj kiuj estas por la vivo de decida graveco, la scio ne sufiĉas aŭ ne eblas, la kredo prenas ĝian lokon, dum skeptiko proekzistade ne estas ekzistipova; ĉi tiu malnova vero validas ankaŭ pri propagandosistemoj.

Ni ĉiuj do devas akcepti certan asertaron kiel veron, eĉ se mankas la ebloj por pruvo aŭ kontrolo. Kaj la enhavo de nia kredo determinas nian konduton en ĉiuj situacioj en kiuj ĝi estas signifa, sed dume ni ne scias al kio kondukos nia konduto. Dum ni opinias ke ni helpas al la scienco, la progreso, la paco, kaj la ĝenerala prospero, ni eble en efektivo rekte kontribuas al milito kaj neniigo. Ni ĉiuj volas konservadi la pacon, sed ĉu por tio ni devas armadi nin, aŭ ne? Ĉi tio ne estas solvebla per dogma kaj ĝenerale valida

formulo, kiel ankaŭ la problemo de la krimeco ne estas solvebla ĉu per plifortigo de la polico, ĉu per ĝia plena forigo. Se ni estas minacataj, kaj se kontraŭ ĉi tiu minaco ni povas defendi nin per armiloj, kompreneble ni devas armi nin, sed kiel, se ĉi tiu minaco konsistas en la konduto de „atakonto", kiu ankaŭ armadas sin nur por sekurigi la pacon kontraŭ nia „atakemo"? Kaj ĉu ni mem efektive scias, ĉu nia armiĝo servas por la konservado de la paco aŭ por atako?

Resume: ni ne konas nian mondon, ni konas nur bildon de ĝi, kaj ne povas kontroli ĉu kaj kiom tiu bildo konformas al la realo. Ni do devus senti nin devigataj al plena skeptiko, se ĉi tio ne estus neebla pro tio, ke ĉi tie temas pri tiaj vivogravaj interesoj. Rilate al la bildo de la mondo ni do staras antaŭ la elekto: kredi aŭ malkredi. Kaj ĉi tiu bildo de la mondo konsistas, se ni esceptas parton de niaj personaj spertoj kaj kelkajn apartajn kampojn tiajn kia (ĝis nun, dank' al dio, ankoraŭ, aŭ eble jam ne plu tute) la scienco, el propagando. Kaj ĉar ni ne konas la realon, ni ankaŭ ne scias, kiaj estos la sekvoj de nia konduto en ĉi tiu realo.

**Faktoj kaj scienca teorio.** — Por ke ni povu fari veran porpacan propagandon, ni kompreneble unue sciu, kion fakte ni propagandu, t.e. pri kio ni konvinku la publikon kaj kiun laŭan konduton ni elvoku ĉe ĝi. Ĉi tio, kompreneble, devas esti konduto kiu firmigas la pacon kaj evitas militon. Ĉar, tamen, pri tio, ni nenion scias, porpaca propagando neniam povas esti la unua paŝo per kiu ni povas komenci nian porpacan laboron. Oni ofte aŭdas, ekzemple, ke armado neeviteble kondukas al milito, sed tiel ĝenerale asertita, tio nepre estas dogmo por kiu mankas kia ajn pruvo.

Sub iuj kondiĉoj ja nepre eblus ke oni devus armegadi sin por konservadi la pacon, kaj en tia kazo porpaca propagando neniel distingiĝus de militpropagando, krom en la intencoj de la propagandistoj, kiujn, tamen, ni ne konas. Principe tute eblas, ke tiel la hodiaŭa Usona-Atlantika, kiel la Rusa-komunisma propagandoj efektive estas sincere intencataj kiel porpaca propagando; ja kiu tion povas konstati? Distingado inter milit- kaj pac-propagando tiam perdas ĉian sencon.

En la hodiaŭaj cirkonstancoj ni povas propagandi — kaj ne inter la amaso — nur unu aferon por servi al la paco: la disvolvadon kaj laŭeble intensan praktikadon de efektiva scienco de la politiko. Por eviti militojn, ni unue sciu precize kiel ili ordinare estiĝas. Kaj por eltrovi tion ni bezonas unualoke certan kvanton da tute certa fakto-materialo, kaj dualoke sciencan teorion kiu ebligas la ordigon kaj adekvatan interrilatigon de ĉi tiu fakto-materialo. Ĉi tiu teorio devos leviĝi konsiderinde super la primitivan nivelon de la plimulto de la nuntempaj politikaj rezonadoj; ĝi do ne pensu en mitologiaj kaj antropomorfaj terminoj, kiaj „Britujo volas ......", „Rusujo ne povas toleri ke ......", „la Blanka Domo trudinstigas al ......", „atakado", ktp. Ĵurnala ĵargono ja ne estas scienca sistemo de nocioj, eĉ se troviĝas en ĝi vortoj pruntitaj el la terminaro de tiu aŭ alia scienco, kiel ekz. „fortoj", aŭ



„streĉoj". Tia teorio devos rigardi internaciajn konfliktojn de same sentemperamenta kaj objektiva starpunkto, de kia oni rigardas, ekzemple, kemiajn reagojn inter diversaj substancoj.

Ni faru al ni neniajn iluziojn: la plenumo de ambaŭ postuloj necesigos la venkon de egaj malfacilaĵoj. La malfacilaĵo ligita al la unua postulo estas: la kolektado de faktomaterialo nepridubebla el fontoj kiuj eble enhavas kaŝan propagandon, dum krome iuj esencaj faktoj eble estas zorge tenataj en sekreto. Tamen ĉi tiu malfacilaĵo ne estas la pli grava: ja la metodoj de la historiscienco, ekonomio, sociologio kaj socia psikologio certe estas ankoraŭ tiel disvolveblaj, ke iam ili estos ankaŭ fruktodone aplikeblaj al la problemoj de la scienco de la politiko. Pli serioza estas la malfacilaĵo ligita al la dua postulo: la prenado de malvarme-objektiva starpunkto en nia situacio alproksimiĝas maltrankvilige al la proekzistada neeblo de plena skeptiko, kiel ni supre montris. Ne estas tiel simple en nia mondo teni malvarma la kapon, kiam temas pri demandoj koncernantaj pacon kaj militon. Sed eĉ se ni ne povos restadi neŭtralaj kaj skeptikaj rilate al la tuta, per propagandaj koloroj pentrita bildo de la realo, tamen tio sukcesos rilate al kelkaj detaloj aŭ eĉ nemalgrandaj fragmentoj el ĉi tiu mondbildo; kaj tiam ni povos, iom post iom, elkonstrui pli bonan sciencan teorion kaj per tio pli bonan bildon de la socia kaj politika realo de nia mondo. Ja ankaŭ aliaj sciencoj tiel disvolviĝis; ankaŭ rilate al la naturo ni venis de animismo kaj mitologio, tra alkemio kaj astrologio, al naturscienco.

Tia scienco, kiam fine ĝi estos sufiĉe disvolvita, rezultigos adekvatan bildon de la realo, liberan de propagandaj intencoj kiuajndirektaj, kaj liberan de la akompanaj distordoj, nekompleteco kaj unuflankeco. Kiam oni disponos pri tia bildo de la realo, oni povos el ĝi konkludi, kiuj homaj kondutoj kondukos al milito, kaj kiuj al paco. Elektinte jam, sur bazo de konscie prirespondita valorosistemo, por paco, oni devos propagandi inter la publiko por elvoki la al paco kondukantan konduton. Ĉe tio oni devos akcepti kiel donitan tion ke la publiko kredeble jam estas influata de multspeca alia propagando, inter kiu eble ankaŭ militpropagando. La unua tasko do estos: zorgi ke „kontraŭpeze" sufiĉa kvanto da propagando estu elverŝata sur la publikon. Oni do devos disponi pri sufiĉe da kanaloj de komunikado, por ke la bildo de la realo kiun la publiko ricevos, estu sufiĉe regata de la farota porpaca propagando. Oni povus kontraŭdiri al tio ĉi, ke la militpropagandistoj kaj iliaj ordonintoj, la veraj potenculoj, neniam toleros ĉi tion. Sed kiu scias kiom el ĉi tiuj en efektivo volas esti porpacaj propagandistoj, kiuj ambaŭmane kaptos la eblon fine fari propagandon kiu vere helpas al la paco? Propagandistoj kaj potenculoj ne ĉiam nepre estas enkarniĝintaj diabloj celantaj nur al la detruo de la mondo!

**Formado de la valorkunfiguraĵo.** — Due, ĉi tiu propagando devas prezenti ne tiom objektive-sciencan bildon de la realo, kiom tian kiu kunefike kun la reala valorkunfiguraĵo elvokas precize tiun konduton, kiun oni, kiel porpaca

propagandisto, deziras. En ĉi tiu aspekto porpaca propagando do ne diferencu de militpropagando, kaj nepre ĝia efikeco ne estu malgrandigata de altaj idealisme-etikaj principoj.

Se montriĝas en la realo, ke propra intereso pli forte influas la homan agadon ol amo al la proksimulo, tia propagando apelaciu al la unua, kaj ne al la dua. Kaj ankaŭ porpaca propagandisto havu la kuraĝon mensogi, kiam tio necesas (kaj kiam tio ne necesas, li ne faru; cetere tute eblas, principe, ke propagandosistemo estas vera en ĉiu vorto).

Se, ekzemple, montriĝus, ke observitaj diferencoj inter homaj rasoj donas kaŭzon por la opinio ke la propra grupo reprezentas „superan" rason, kaj ke el tio ĉi povos rezulti konfliktoj, do porpaca propagando ne rajtas doni objektive-sciencan klarigon de la kunligitaj problemoj (kvankam, kompreneble, pro la pozitiva estimo antaŭ ĉi tiuj nocioj, ĝi asertu esti objektiva kaj scienca), sed tute konscie ĝi kaŝu, malklarigu kaj malgrandigu eventuale reale ekzistantajn rasdiferencojn. Kaj se, ekzemple, „esti senantaŭjuĝa" signifas por la publiko pozitivan valoron, ĉi tiu propagando devos sisteme etikedi la opinion ke ekzistas esencaj rasdiferencoj, kiel „antaŭjuĝon", kaj ĝi enhavu de la vero nur tiom, kiom absolute ne eblas nei. En la propagando troviĝu nur tiu parto de la vero, kiu al la publiko povos servi kiel bonvena motivado por la de la propagandisto dezirata konduto. Kaj se ĉi tiu parto ne konsistiĝas en si fermitan tuton, oni devos kompletigi ĝin per ...... mensogoj? ......, nu, do per fantaziaĵoj aŭ „hipotezoj".

Ĉi tio sonas sufiĉe makiavele, sed neniel signifas forĵeton de ĉia etiko; ĝi signifas nur forrifuzon de la unuflanka „vero"- kaj „objektiveco"-fanatiko kiun ĉi-rilate oni ankoraŭ tro emas rigardi kiel la fundamentan principon de ĉiu etiko. Tiom esenca kiom estas la strebado al objektiveco kaj vero en scienco, tiom akcesora, tiom senutila, kaj en iuj cirkonstancoj eĉ tiom malutila ĝi estas en farado de propagando. Konduto kaj konvinkoj ja ne estiĝas sur la bazo de objektivaj, logikaj kaj raciaj motivadoj, kaj oni do ankaŭ ne povas influi konduton en ĉi tiu maniero.

Anstataŭ intenco-etikon ĉi tie ni bezonas respondeco-etikon, kiu unue demandas: al kio kondukos la influado kiun mi praktikas, kaj ĉu la rezulto akordos kun la fundamentaj, ĝenerale akceptitaj valoroj kies realigo povos kontribui al „la laŭeble plej granda feliĉo por la laŭeble plej granda nombro da homoj"? Ni havu la kuraĝon rekoni, ke la celo vere sanktigas la rimedojn, kondiĉe ke la rimedoj ne estu kontraŭaj al la celo ...... kaj tiukaze ili laŭdifine jam ne estas „rimedoj".

Pri la praktika plenumebleco de ĉi tiu programo, fine, jenon: ankaŭ por povi respondi la menciitan etikan demandon pri la rezulto de siaj agoj, necesas ke oni povu antaŭdiri tiun rezulton. Por tio ĉi, kiel jam dirite, necesa estas multe pli progresinta disvolviteco de la politikaj kaj sociaj sciencoj, kaj ĉi tiu disvolvado eble bezonos ankoraŭ jardekojn aŭ jarcentojn. Sed ni ĉiam povas k o m e n c i la plenumon de programo; la sola, kio povus nin paralizi ĉe tio, estas la t i m o ke eble ni ne finos la taskon antaŭ la pereo de la mondo. Ĉar ĉi tiu timo ŝajnas superrega en iuj rondoj, unu el la unuaj taskoj estos kontraŭbatali ĉi tiun timon, eĉ se ni ne povas proponi ion pli bonan ol la fido ke la mondo ankoraŭ dum iom da tempo daŭriĝos sian stumblan iradon, ĝis ni scios pli kaj povos fari pli.



Se pri ĉi tiu temo ni volus diri pli ol ni supre jam faris, tio fariĝus ree tute nova ĉapitro, ne rekte koncernanta la temon de ĉi tiuj artikoloj kaj grandparte ekster la kompetento de la aŭtoro. Oni tamen faru al si la demandon, al kiu la respondo ĉi-supre fakte jam estas indikita: ĉu ĉi tiu timo, kiu, kiel ĉiu timo, ne povas esti racie motivata, eble estas en grava mezuro la sekvo de propagando?


**Literaturo pri propagando:** Kelkaj verkoj en kiuj troviĝas, apud aliaj temoj, bona pritrakto de diversaj aspektoj de propagando, estas:

1. R. T. L a P i e r e kaj P. R. F a r n s w o r t h, *Social Psychology*, tria eldono, Novjorko, 1949. (Sufiĉe simpla enkonduko emfazanta sociokulturajn faktorojn; en detalaj notoj la temo estas ofte pli funde kaj ankaŭ polemike traktata).
2. D. K r e c h kaj R. S. C r u t c h f i e l d, *Theory and Problems of Social Psychology*, Novjorko 1948. (Multe pli malfacila ol 1, pli psikologie orientita).
3. L. W. D o o b, *Politic Opinion and Propaganda*, Novjorko, 1948. (Ĝis nun la plej multflanka enkonduko en ĉi tiun kampon; facile legebla, sed iom malkonciza kaj ne tre kritika).
4. B. L. S m i t h, H. D. L a s s w e l l, kaj R. D. C a s e y, *Propaganda, Communication and Public Opinion*, Princeton, 1946. (Ĉi tiu verko enhavas, krom kelkajn mallongajn monografiojn, laŭsisteman bibliografion de 2558 titoloj).
5. T. R. V a l l a n c e, *Methodology in Propaganda Research*, Psychol. Bull. 48 1 (jan. 1951) (Konciza monografio klare formulanta ĉefe teoriajn kaj metodologiajn vidpunktojn).


## ĈU ESPERANTO POVAS HELPI EN LA KONSERVADO DE PACO?

de W. P. ROELOFS.

Spite iun opozicion kontraŭ la interna ideo, oni ne povas nei ke multaj Esperantistoj venis al Esperanto ne ĉar ili atendis de ĝi tujan profiton por si persone, sed el iu idealismo, el iu sopiro al paco, ĉar iel ili kredis ke la eblo de senpera kontakto inter diversnacianoj helpos al reciproka kompreniĝo, al